nia voĉo

madrida esperanto-liceo aprilo 2020

## ĈIUJ ĈEESTAJ AGADOJ NULIGITAJ PRO LA KRONVIRUSO

Kiel ĉiuj niaj legantoj bone scias, Madrido kaj granda parto de la cetera mondo troviĝas en stato de deviga enhejmiĝo pro la epidemio de kronviruso Covid-19.

Dum tiuj ĉi semajnoj la sidejo troviĝos fermita, kaj estis nuligitaj ĉiuj regulaj kunvenoj en ĝi. Ankaŭ nuliĝis, evidente, la sabata renkontiĝo ekster la sidejo.

Hispana Esperanto-Federacio anoncis la prokraston de la nacia kongreso, programita por komenco de majo en Comillas (Kantabrio). La plano estas malfruigi ĝin, ĝis la monato oktobro, konkrete inter la 9a kaj 13a, profitante la festotagon de la 12a de oktobro.

Multaj aliaj ĉeestaj esperantistaj renkontiĝoj estis ankaŭ nuligitaj aŭ prokrastitaj. Momente, UEA kaj TEJO planas okazigi respektive la Universalan Kongreson de Montrealo kaj la IJK en Nederlando, sed ambaŭ anoncis ke ili plu studas la disvolvon de la novaĵoj, por reagi depende de la daŭro de la pandemio.

## DAŬRIGU VIAN ESPERANTUMADON EN LA RETO

Granda parto de la aktivado en kaj por Esperanto translokiĝis al la reto.

Hispana Esperanto-Federacio publikigis en sia retejo artikolon por informi pri la eblecoj lerni la lingvon hejme, dum la deviga endoma restado. Ĝi aperas en la ĉefpaĝo de la retejo http://esperanto.es.

Sekve al ĝi, la senpaga ĵurnalo “20 minutos” publikigis artikolon kun intervjuo al la prezidanto de HEF, pri tiu ebleco. Voĉa peco kun tiu invito estis elsendita en la radiostacio Onda Madrid la 27an de marto en la programo “Buenos días, Madrid”.

## Libroj kaj revuoj




HEF ankaŭ publikigis novan numeron de sia bulteno “Boletín”. Pro la cirkonstancoj, ties sendo al la anoj okazis nur per retpoŝto; la papera eldono estos sendata nur kiam tio estos konsilinda. Dume, HEF decidis permesi la aliron de ĉiu esperantisto, sendepende ĉu ili estas anoj aŭ ne, al ĉiu numero de “Boletín”, inklude de la plej novaj. Vi trovos la koncernajn ligilojn ĉe la ĉefpaĝo en Esperanto de ĝia retejo: https://www.esperanto.es/hef/index.php/komenco.

La eldonantoj de la revuo “Monato” regalas la multajn homojn en la mondo kiuj nun devas resti hejme pro la kronviruso Covid-19 per senpagaj ekzempleroj. En https://monato.be/pdf vi povas trovi la tri plej freŝajn numerojn en la formoj PDF kaj en la dosierformoj ePub kaj Mobipocket.

Plej lastajn numerojn de la revuoj de ILEI vi povas trovi ĉe https://www.ilei.info/revuoj/.

Ankaŭ Eldonejo Libera decidis senpage disponigi ĉiujn siajn elektronikajn librojn. Vidu en la retejo: http://www.eldonejolibera.be/

Multaj aliaj retpaĝoj ebligas aliron al esperantaj libroj, ĉu senpage, ĉu kontraŭ modesta sumo. Se vi deziras orientiĝi pri la ĉefaj beletraĵoj en Esperanto, ni rekomendas ke vi komencu per la "baza legolisto" kiun siatempe kompilis la verkisto William Auld (https://eo.wikipedia.org/wiki/Baza_legolisto).

## Muziko kaj videoj

Se vi pli emas al aŭdvidaj kulturaĵoj, ankaŭ pri tio nuntempe plenas la reto. Ekzemple, Vinilkosmo kreis en sia jutuba kanalo ludlistojn de muziko en Esperanto, kun rekomendoj por pasigi tiun ĉi periodon. Vidu: https://www.youtube.com/user/vinilkosmo/playlists.

Aliaj kantoj estis produktitaj por tiu ĉi momento: spektu la kanton "Imagu" fare de kelkaj el niaj plej famaj artistoj: https://www.facebook.com/Jomka/videos/10217350075647191/.




Se temas pri ĝeneralaj videoj, nepre spektu tiun kunordigitan de TEJO, pri diversaj spertoj de esperantistoj ĉirkaŭ la mondo rilate al Covid-19. TEJO nun pretigas novan videon, al kiu vi mem povas partopreni, sed vi devas rapidi, ĉar la limdato por sendi vian sperton finiĝas la 1an de aprilo. Vidu la antaŭan videon kaj la proceduron ĉe: https://www.tejo.org/novajoj/.

## Retaj kunvenoj

Diversaj asocioj, kluboj kaj ankaŭ neformalaj grupoj decidis daŭrigi siajn kunvenojn per virtualaj rimedoj. Ili uzas programojn, aplikaĵojn aŭ renkontiĝejojn kiel Skype, Zoom aŭ Jitsi. Ekzemple, SAT kreis virtualajn kunvenojn per https://meet.jit.si/KontrauIzoligho, kaj la valenciaj samideanoj renkontiĝas ĉe: https://meet.jit.si/Esperantio. Aliajn vi povas trovi per sociaj retoj. Esploru!

Ankaŭ radio-amatoroj kunvenas, uzante tradiciajn rimedojn aŭ aplikaĵojn kiel CB-Talk.

Edukado.net aperigas intervjuojn kun la temo Kronvirusa Pandemio (jam 5 ĝis la finredakto de tiu ĉi numero). Ili ne nur informas, amuzas sed donas ankaŭ bonan okazon ekzerci vian komprenkapablon kaj riĉigi vian vortprovizon.

## POR PLIAJ INFORMOJ

Por esti informitaj pri novaĵoj, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, kaj la retliston http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madride/.

En *Fejsbuko* vizitindas la forumo de MEL: https://www.facebook.com/esperanto.madrid/ aŭ la pli ĝenerala https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/. Alia ebleco troviĝas en *Meetup*: http://www.meetup.com/Madrid-Esperanto-Conoce-aprende-practica-y-disfruta.

RESTU SANA, RESTU HEJME

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com